# Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

| N-ro 2 1974 | ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO Redaktoro: Hans Amund Rosbach | 3-a periodo 41-a (50-a) jaro Dumonata |
|---|---|---|


# Esperanto-kongreso en la Arktiko

Norvegujo estas longa lando. Tial bedaŭrinde ĉiam multaj samideanoj devus travojaĝi longan distancon por atingi nian landan kongreson.

Nur malofte ni havis okazon kongresi en la norda parto de la lando. Sed nun la malgranda, sed tre aktiva kaj kuraĝa Esperantoklubo La Norda Lumo en Tromsø invitis al sia urbo la 44an Norvegan Esperanto-Kongreson, kaj la Liga Estraro danke akceptis, ke la kongreso okazu en Tromsø 5.—6. Julio 1975. La klubo jam vigle komencis la preparlaborojn.

Tromsø estas nomata «la pordo al la Arktika Maro». Sed ne timu: somere la klimato tute ne estas arktika, la temperaturo povas atingi + 25° C! Kaj ĉu vi scias, ke kun siaj 2400 km$^2$ Tromsø estas laŭ areo la plej granda urbo de la Nordo? La loĝantaro proksimiĝas al 50 000. La urbo ankaŭ estas la «ĉefurbo» kaj universitata urbo de Norda Norvegujo.

La naturo kaj la vivformo en Norda Norvegujo estas tute alia, ol en la sudo. La kongreso okazos en la sezono de la noktomeza suno, kiam la suno brilos tage kaj nokte. Komprenéble oni ne iros al Tromsø nur por kelkaj kongresaj tagoj. — La Loka Kongresa Komitato jam preparas diversajn postkongresajn aranĝojn, ekskursojn al la plej vizitindaj lokoj en la ĉirkaŭaĵo, kaj, se anonciĝos sufiĉe da partoprenantoj, oni ankaŭ klopodos aranĝi ekskurson eĉ al la Norda Kabo, la plej norda punkto de Eŭropo.

Esperanto-kongreso apud la Arktika Maro ne estas ĉiutaga evento. Tial oni intencas inviti esperantistojn el la tuta mondo, tiel, ke fariĝos ne nur norvega, sed vere internacia esperantista renkontiĝo. Preparu vin jam nun, aranĝu, ke vi pasigos vian someran libertempon 1975 en la ĉarma, ekzotika nordo. La (provizore) plej norda Esperanto-klubo de la mondo atendas vin kaj faras sian eblon por doni al vi unikan travivaĵon.

# Sciigoj de N.E.L.

*Norvega Esperantisto kaj la kotizo,* Ĉiujare kelkaj membroj pagas sian kotizon tre malfrue en la jaro, ofte nur post pluraj urĝigoj. Tio estas grava malhelpo por ni. Tiu ĉi numero de la gazeto estas la lasta kiun ni sendas al nepagintaj membroj, klubaj kaj rektaj. Kiam ni poste ricevos la kotizon, ni postsendos la numerojn, kiujn la koncerna membro ne ricevis, sed ĉar ja estas maloportune ricevi kelkajn malnovajn numerojn kune, estas konsilinde pagi la kotizon frue, kiel postulas la statuto. Tio ankaŭ ŝparas al ni multe da nenecesa ekstra laboro.

*Taskotabelo por kluboj. — Aprilo:* Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La kasisto sendas al N.E.L. kaj al la distrikto kotizojn kaj liston pri la malfruiĝintaj kaj eventualaj novaj membroj.

*Majo :* Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La estraro diskutas la aŭtunan laboron kaj starigas planojn pri kursoj kaj aliaj aktivecoj dum la venonta aŭtuno.

*La Liga Estraro.*

### *La kontorfondaĵo 1973*

| | |
|---|---|
| Pli frue | kr. 1618,50 |
| A. Refsing | » 200,00 |
| O. Rygg | » 100,00 |
| | kr. 1918,50 |

### *La kontorfondaĵo 1974*

| | |
|---|---|
| Lauge Madsen | kr. 100,00 |
| R. Berli | » 10,00 |
| W. Gjertsen | » 6,20 |
| Bj. Aandahl | » 80,00 |
| S. Gjermundnes | » 20,00 |
| E. Gjessing | » 20,00 |
| C. S. B. | » 20,00 |
| S. Ebeltoft | » 24,00 |
| J. Berggreen | » 15,00 |
| G. Jæger | » 15,00 |
| G. & A. Høibo | » 10,00 |
| Aa. Haube Nielsen | » 10,00 |
| A. Refsing | » 200,00 |
| | kr. 530,20 |

### *La Propaganda Fondaĵo 1974*

| | |
|---|---|
| Lauge Madsen | kr. 100,00 |

(La kvitancoj en la pasinta numero temis pri 1973, ne 1974.)

### *Kampanjo Reisæter 1974*

| | |
|---|---|
| Pli frue | kr. 700,00 |
| G. Jæger | » 100,00 |
| | kr. 800,00 |

### *Donaco al la Liga Kaso*

| | |
|---|---|
| Anonimulo | kr. 100,00 |

Sinceran dankon al la donacintoj !

### *Membroj subtenantaj 1974 :*

Agnethe Anjer
Ludvig Anjer
Elna Matland
Johan Matland
Olaf Mæland
Ågot Pedersen





**Norvega Esperantisto**
ESPERANTOBLADET

**Provizora redaktoro :**
Hans Amund Rosbach

**Adreso de la redakcio :**
Nergt. 37 c, 6500 Kristiansund N
(Limdato por manuskriptoj : la 20. en la monato antaŭ la apero.)

**Abonprezo :** En Norvegujo kaj eksterlando : n. kr. 12,—.

**Anoncprezoj:** 1/1 p. kr. 150, ½ p. kr. 75, ¼ p. kr. 40, ⅛ p. kr. 20.

## Pagu vian kontribuaĵon!

## Aliĝu al Kampanjo Reisæter !

Ĉi tiu kampanjo por fortigi nian ekonomion estas establita en la jaro 1972 laŭ ideo de Trygve Reisæter, fidela samideano en Odda. Lia propono estis, ke minimume 100 esperantistoj en Norvegujo donu minimume po 100 kronoj ĉiujare dum tri jaroj al nia movado. Tiam N.E.L. havus la sumon de 30 000 kronoj je dispono, kaj per ĝi nia ligo povus atingi almenaŭ kelkajn celojn en la laboro por disvastigo de Esperanto.

En la jaro 1972 envenis 1800 kronoj, en la jaro 1973 2900 kronoj. Kelkaj jam pagis por tri jaroj. Ŝajnas al mi, ke ĉi tiu sumo estas ridinde malalta! Kaj nun ni jam estas en la tria jaro. Tiuj, kiuj jam enpagis sian unuan aŭ siajn du unuajn kontribuaĵojn, povos nun finpagi en ĉi tiu jaro. Ili estas dankindaj, tiuj, kiuj kontribuis kaj per tio montris al nia liga estraro dankemon kaj fidon.

Sed jen miaj vortoj direktiĝas al vi, kiu ankoraŭ ne agis! Ĉu mi rakontu al vi, ke jam la liga estraro havis grandan utilon de la kolektita monsumo? Se tiu modesta sumo de 4700 kronoj ne troviĝus, nia Esperantomovado i. a. ne sukcesus starigi sian budĝeton por la jaro 1974 !

Mi esperas, ke ĉi tiu fakto igas vin pensi, kaj ne nur pensi, sed agi! Ĉar ni troviĝas en la tria jaro de la kampanjo, vi povas elekti ĉu vi volas enpagi nur la unuan kontribuaĵon de 100 kronoj, aŭ du aŭ tri.

Sed ne hezitu! Iru jam morgaŭ al la poŝtoficejo; la adreso estas Norsk Esperanto-Forbund, Boks 942, Oslo 1, poŝtĝiro 1.00.30. Kaj notu sur la slipon: Kampanjo Reisæter.

Kun bona konscienco vi tiam povos endormiĝi en la vespero!

*Elna Matland.*

### Kampanjo Reisæter 1974

| | |
|---|---|
| En la pasinta numero elfalis unu nomo: Kr. Sivertsen | kr. 100,— |
| Pli frue | kr. 700,— |
| G. Jæger | kr. 100,— |
| | kr. 800,— |

## Korespondu !

28-jara ministro deziras korespondi kun norvegaj familioj. Beleznai János, Győri u. 16, H-2800 Tatabánya, Hungarujo.

Japanaj geknaboj dez. korespondi kaj interŝanĝi fotojn.. — Esperanto-klubo de Honĵo-Kooko, Mukoĵima 3-37-25, Sumida, Tokio, 131, Japanujo.

# NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

## *Jarraporto 1973*

ESTRADO

*La Liga Konsilantaro* konsistis de la jarkomenco el:

Prezidanto: C. Støp-Bowitz
Vicprezidanto: Kjell Gustavsen
Ĝenerala sekretario: John Berggreen
Sekretario: Signe Korstvedt
Kasisto: Karl Ekhaugen
Estraranoj: Olav Rygg, Kirsten Ek
Anstataŭantoj: Harda Danielsen, Otto Prytz, Nils Chr. Stenseth

Ceteraj konsilantaranoj:

Lars Kåre Hunnes, Trondhejmo;
Steffen Kjetland, Haugesund;
Per Johan Krogstie, Løten;
Elna Matland, Sauda;
Herolv Olsen, Tromsø.

Revizoroj:

Aslaug Refsing, John Selbekk.

Ĉar la kasisto kaj konsilantarano Steffen Kjetland ne deziris reelekton, la Landa Kunveno 2.—3. Junio 1973 elektis kiel novan kasiston Aase Haube Nielsen kaj kiel novan konsilantaranon O. J. Rønnevig, cetere la tuta Konsilantaro reelektiĝis, kaj ankaŭ la revizoroj.

*Landa Kunveno* okazis 2.—3. Junio er Haugesund dum la 43a Norvega Esperanto-Kongreso. La kunveno i.a. decidis plialtigi la kotizojn kaj akceptis rezoluciojn al organizaĵoj kaj personoj kun internaciaj interesoj, al norvegaj skoltoj, al norvegaj kinejoj kaj al la Norvega Radio.

ADMINISTRADO

*Estrarkunvenoj.* Okazis 7 estrarkunvenoj (7 en 1972), kaj oni protokolis 85 punktojn (70 en 1972).

*Cirkuleroj.* La Estraro elsendis al la kluboj kaj distriktoj 6 cirkulerojn, i. a. kun invito al mendo de donackaj propagandabonoj al Norvega Esperantisto kaj pri la prelegvojaĝo de A. Ciccanti Cetere oni publikigis informojn al la membraro en la rubriko «Sciigoj de N.E.L.» en Norvega Esperantisto. 3 el la cirkuleroj estis sendataj ankaŭ al la rektaj membroj.

*Oficejo.* La tenado de la oficejo en General Birchsgt. 30 estas ebla nur per la malavara subtenado flanke de la membroj per la oficeja fondaĵo (kontorfondaĵo). Pluraj pagas libervolan monatan kontribuon. La oficejo servas samtempe por Eldonejo Esperanto A/S kaj por Klubo Esperantista en Oslo, kiuj pagas parton de la luprezo. En la malnova oficejo en Nedre Slottsgt. 3 oni kolektis la bibliotekon. La oficejon estris precipe la prezidanto. Estis regula deĵoro tie dufoje semajne. La laborojn dividis inter si la estraranoj. La Ligo, la Eldonejo kaj la Klubo havas komunan telefonon.

*La Oficeja Fondaĵo* dum la jaro donace ricevis kr. 1918,50 (en 1972 kr. 2114,00). La Estraro kore dankas al la kontribuintoj.

*Kampanjo Reisæter.* — En 1973 19 personoj kaj unu klubo donacis kr. 2900 (2 personoj pagis tuj por 3 jaroj, unu por 2 jaroj, Mara Vento, Haugesund kr. 500).

*Kunlaboro kun N.E.F.A.* Daŭre bone funkcias la interkonsento kun Norvega Esperantista Fervojista Asocio. Ĝi disponas unu paĝon en Norvega Esperantisto kiel sian oficialan organon, ĉiuj membroj de N.E.F.A. estas abonantoj de Norvega Esperantisto, kaj la kaso de N.E.F.A. pagis kr. 300 kiel kontribuon al la preskostoj.





DISTRIKTOJ, KLUBOJ KAJ MEMBROJ

*Distriktoj.* Precipe Okcidenta Distrikto bone laboris, Orienta, Meza kaj Nordlanda Distriktoj estis malpli aktivaj. — Nord-Norvega Esperanto-Distrikto ne funkcias.

*Kluboj.* Je la jarfino 1972 N.E.L. havis 18 aliĝintajn klubojn. Unu nova klubo fondiĝis (Grenland), unu malfondiĝis (Løten), aŭ pli ĝuste ĝi kunfondiĝis kun alia (Hamar). Je la jarfino 1973 N.E.L. sekve havis 18 klubojn.

Membrostatistiko:

| | |
|---|---|
| Bergen, La Esp.klubo de, Ok. D. | 23 |
| Bodø Esperantoklubb, N. D. .... | 12 |
| Bryne, Jæren, La Vanelo, Ok. D. | 9 |
| Gjøvik, Klubo Esp.ista de, Or.D. | 5 |
| Halden, Ascendo, Or. D. ........ | 9 |
| Hamar, La Norda Stelo, Or. D... | 24 |
| Harstad, Noktomeza Suno, N.N.E.D. ... | 5 |
| Haugesund, Mara Vento, Ok. D. | 50 |
| Jørpeland, Pacaj Batalantoj, Ok. D. ..... | 6 |
| Kristiansands Esperantoklubb .. | 15 |
| Mo, La Esperantoklubo de, N. D. | 5 |
| Odda, La Glaciaro, Ok. D. ...... | 5 |
| Oslo, Klubo Esp.ista en, Or. D. .. | 146 |
| Sarpsborg, La Urso, Or. D. ..... | 21 |
| Sauda Esperantoklubb, Ok. D. .. | 14 |
| Skien, Grenland Esp.klubb, Or.D. | 6 |
| Tromsø, La Norda Lumo, N.N.E.D. | 7 |
| Trondhejmo, Grupo Esperantista, M. D. .... | 26 |
| Sumo: | 388 |
| Individuaj membroj .......... | 121 |
| Entute: | 509 |

La mallongigoj post la nomoj de la kluboj montras la distrikton, al kiu la klubo apartenas.

Specifo de la membraro laŭ kategorioj:

| | | |
|---|---|---|
| Klubanoj: | | |
| Ordinaraj ................ | 271 | |
| Junulaj .................. | 36 | |
| Familiaj ................. | 54 | |
| Junaj familiaj ........... | 12 | |
| Honoraj .................. | 2 | |
| Dumvivaj ................. | 2 | |
| Subtenantaj .............. | 11 | |
| | | 388 |
| Individuaj membroj: | | |
| Rektaj membroj ordinaraj.. | 87 | |
| Rektaj membroj junulaj ... | 7 | |
| Rektaj membroj familiaj .. | 3 | |
| | | 97 |
| Dumvivaj membroj .......... | | 13 |
| Subtenantaj membroj ........ | | 11 |
| Entute: | | 509 |
| Klubanoj (Oslo) aliĝintaj dum la 4a jarkvarono, ne pagintaj kotizon por 1973 ............. | | 1 |
| | | 510 |

Krome pagis 4 kontribuaj membroj.

Entute la membronombro montras kreskon de 3 membroj, t. e. 0,6 % kompare kun la antaŭa jaro.

KUNLABORO

*Superrigardo.* (Ĉar nur 12 el la 18 kluboj ĝis nun sendis ĉiujn devigajn raportojn, kelkaj el la subaj ciferoj eble estas tro malaltaj.) Suma membronombro je la 1/1-73: 376. Aliĝoj: 35, eksiĝoj: 23. Membronombro je la 31/12: 388. — Okazis 139 klubkunvenoj, meznombre ĉeestis proks. 50%. Raportiĝis 38 estrarkunvenoj, 11 festoj, ekskursoj k.t.p. En 3 kluboj laboris 3 studrondoj kun proks. 17 membroj. 6 kluboj raportas pri biblioteko kun 632 volumoj. 60 klubanoj posedas elementan ekzamenon, 47 superan, 4 instruistan.

La kluboj grandparte kontentige raportadis, sed la estraro ankaŭ zorge urĝigis pri mankantaj raportoj. — La intereso inter la membroj grandparte ŝajnas esti bona.

*Teatra Sekcio,* gvidata de C. Støp-Bowitz, sendis distraĵojn al kluboj, kiuj petis pri tio.

STUDLABORO

*Kursgvidantoj.* Neniu eksterlanda kursgvidanto agadis en la lando dum 1973, sed en kelkaj lokoj okazis kursgvidataj de lokaj fortoj.

*Kursoj.* Raportiĝis nur 6 kursoj por komencantoj kun sume 36 kursanoj en Hamar, Haugesund, Oslo, Tromsø, kaj neniu kurso por progresantoj. Kredeble okazis ankaŭ kelkaj kursoj, pri kiuj raportoj ne estas ricevitaj, aŭ kiuj je la jarfino ankoraŭ ne finiĝis.

*Korespondaj kursoj.* La Sekcio pri Koresponda Instruado estis gvidata de Else-Margrethe Müller, Trondhejmo. Estis bona kunlaboro kun «Folkets Brevskole», kiu uzis la kursojn de N.E.L., sed mem prizorgis administradon kaj anoncadon. N.E.L. havigis instruiston kaj ricevis raportojn pri lernantoj, kiuj plenumis la kursojn ĉe «Folkets Brevskole». Ankaŭ Norvega Blindula Asocio utiligas la kursojn. — Ĉe N.E.L. aliĝis al la unua parto 82 kursanoj, al la dua parto 50. Oni ne plu liveris la kursojn por reduktita tarifo al gejunuloj. Ĉe «Folkets Brevskole» aliĝis al la unua parto 16 kursanoj, al la dua parto 1. — Ĉiuj, kiuj plenumis la unuan parton, kaj ne jam estis membroj, ricevis duonjaran abonon al Norvega Esperantisto kaj proponon pri membreco. Instruis Erling Holten kaj L. K. Hunnes, por gejunuloj Ludvig Anjer, por «Folkets Brevskole» L. K. Hunnes. La provizo de la unuaj kursleteroj denove elĉerpiĝis, kaj oni devis denove multobligi ilin; je la jarfino la unua parto definitive elĉerpiĝis. Tial la kurso ne estis anoncata kiel kutime en semajna gazeto. — La reviziita unua parto aperis libroforme el la presejo en la fino de la jaro, en 3000 ekzempleroj; bindado de la dua parto baldaŭ okazos. Samtempe «Folkets Brevskole» transprenas la funkciigon de la tuta kurso aĉetante la kurslibrojn de ni, N.E.L. nur reklamos, peras mendojn kaj varbas la plenumintojn kiel membrojn. La vendadon de la kurslibroj kiel ordinaraj lernolibroj prizorgos N.E.L., eventuale per Eldonejo Esperanto A/S. — La presadon de la nova kurslibro oni pagis per la





kapitalo de la Sekcio pri Koresponda Instruado kaj pruntepreno de 4473,34 kr. el la Propaganda Fondaĵo. Aldoniĝos bindado de la dua parto kaj presado de informmaterialo.

*Gazeta kurso* aperis en 1973 en neniu gazeto.

*Perfektiga studado.* La Ekzamena Komisiono ankaŭ en 1973 korektadis taskojn por interesiĝantoj. Oni aparte klopodis igi la membrojn studi por ekzameno.

*Ekzamenoj.* — Ordinara ekzameno okazis en Novembro en Oslo. Unu kandidato plenumis la elementan ekzamenon. La Ekzamena Komisiono konsistas el: C. Støp-Bowitz (prez.), Olav Rygg (sekr.), Eva Støp-Bowitz (kas.), Otto Prytz kaj Einar Gustavsen (membroj). Ekzistas 5 lokaj ekzamenaj komitatoj, nome en Bergen, Haugesund, Sauda, Trondhejmo, Østfold, kaj 7 ekzamenaj delegitoj ekster la komitatoj.

INFORMADO

*Informa Fako* (Komisiito pri Informado: Ludvig Anjer). La komisiito dissendis du cirkulerojn i. a. pri agado rilatanta al la Semajno de Internacia Amikeco kaj al la 25jara jubileo de la Deklaracio de Homaj Rajtoj. Pri la Semajno de Internacia Amikeco disiris speciala cirkulero al la gazetaro kaj al diversaj organizaĵoj kaj institucioj. La komisiito reprezentis N.E.L.n en la kunsido de Informaj Fakoj en la Kongreso en Beograd.

*La Propaganda Fondaĵo* ricevis donacojn de kr. 445,00. Bankinterezoj estis kr. 454,78. El la fondaĵo oni uzis kr. 530,30. La fondaĵo posedis je la jarfino kr. 10472,86, el kiu sumo oni pruntedonis por la presigo de la nova lernolibro kr. 4473,34.

*«Esperanto-nytt».* Ankaŭ en 1973 la komisiito pri informado ne reaperigis tiun informbultenon.

*Informbroŝuroj.* — Kelkaj kluboj aĉetis kvantetojn de la du broŝuroj. De «Det internasjonale språket - Esperanto» restas proks. 17000 ekzempleroj, de «La Internacia Lingvo» proks. 6000, de la flugfolieto proks. 3000. — La faldfolio «Velkommen til Esperanto-bevegelsen» estas reeldonita en reviziita formo en 3000 ekz.

*Gazetara Servo,* gvidata de Elna Matland, elsendis al la norvegaj ĵurnaloj 8 bultenojn kun sume 21 novaĵoj pri Esperanto, parte pere de lokaj reprezentantoj. Oni daŭre abonis eltondaĵojn per la firmao «Argus». Oni registris 203 aperigojn de novaĵoj elsenditaj de la Gazetara Servo kaj 114 novaĵojn kaj 80 artikolojn, debataĵojn, referaĵojn el aliaj fontoj. Entute oni do registris 397 aperigojn (403 en 1972) en 99 gazetoj kaj revuoj (99 en 1972). Atakoj al Esperanto apenaŭ aperis.

*Radio kaj televido* (komisiito: Kirsten Ek). — En programero «På en kveld som denne» aperis 5-minuta intervjuo okaze de la 43a Norvega Esperanto-Kongreso en Haugesund, en «Bodstikka» (junulara programo) 10-minuta programo. En Tromsø aperis programo okaze de la vizito de pastro Ciccanti. En «Vigra lokal» Hans Amund Rosbach parolis 10 minutojn. En «Bergen lokal» estis intervjuo kun Ciccanti, 5 minutojn. En la televida programo «Husker du?» Th.

Smådahl en intervjuo raportis pri siaj spertoj per Esperanto.

*Interŝtataj organizaĵoj* (komisiito: R. Bugge-Paulsen). Pri la skandinavia propono al UNESKO estas nenio nova. Dum la 1-a Eŭropa Esperanto-Kongreso en Luksemburgo en Junio 1973 stariĝis «Eŭropa Esperanto-Centro por la landoj de la Komuna Merkato», kaj ellaboriĝis konvencio pri kunlaboro inter la Landaj Asocio de la membroŝtatoj. Pri la Nordlanda Konsilantaro estas nenia novaĵo.

*Blinduloj* (komisiito: Otto Prytz). La sonbenda eldono de Norvega Esperantisto, prizorgata de Ludvig Anjer, havis 6 abonantojn, kaj Kluba Bulteno de Klubo Esperantista en Oslo estas daŭre surbendigata de John Berggreen por la blindaj membroj. La du lastaj volumoj de Erling Anker Haugen: «Esperanto-Norsk grunnordbok» aperis. En la organo de «Norges Blindeforbund» aperis artikolo de Åshild Birkenes pri la Universala kaj la Blindula Kongresoj en Beograd. La komisiito pasigis preskaŭ la tutan jaron eksterlande.

*Skoltoj.* La komisiito, Hans Amund Rosbach, sendis «La Skolta Mondo»n al diversaj interesiĝantoj. Oni daŭre laboras por oficialigo de Esperanto dum la monda ĵamboreo ĉe Lillehammer en 1975.

*La Junulara Sekcio,* gvidata de Nils Stenseth, ampleksas 53 membrojn, inter ili 18 junulaj membroj de Studenta Esperanto-Societo en Oslo. Pro foresto de la gvidanto en Usono dum granda parto de la jaro estis malmulte da aktiveco. «Kvinpinto», la organo de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo, kiu estas organo ankaŭ de la norvega junulara sekcio, ne aperis. La Studenta Esperanto-Societo daŭre aktivas, i. a. ĝi eldonis Katalogon pri interlingvistika literaturo en la Universitata Biblioteko en Oslo, kaj starigis manuskript-serion en la Universitata Biblioteko. La societo estas grupo de Klubo Esperantista en Oslo.

*Fakseckio por Instruistoj.* — Elna Matland transprenis la gvidadon en Septembro, kaj ŝi komencis reaktivigi la sekcion, i. a. per cirkulero al la membroj kaj per anoncoj en «Norsk Skoleblad». La sekcio havas 41 membrojn.

*Esperanto en la lernejojn* (prez. de la Komisiono por Lerneja Kampanjo: C. Støp-Bowitz). Oni daŭre atendas iniciatojn de norvegaj instruistoj kaj lektoroj esperantistaj por akiro de permeso por eksperimenta instruado de Esperanto en siaj lernejoj. De 1974 la taskoj de la Komisiono estas transdonitaj al la Fakseckio por Instruistoj.

*Informaj prelegoj.* Raportiĝis 4 informaj prelegoj en Alvdal, Beitostølle, Larvik kaj Oslo, kun proks. 170 aŭskultintoj.

*Prelegvojaĝo.* En Septembro la itala franciskana pastro Albino Ciccanti efektivigis sukcesan prelegvojaĝon tra tuta lando, norden ĝis Tromsø kaj Alta. Ĝi vekis grandan eĥon, antaŭ ĉio en la gazetaro.

*Ekspozicio.* Klubo Esperantista en Oslo, kunlabore kun NEFA, aranĝis en Septembro ekspozicion en centra ejo; la ekspozicio altiris konsiderindan publikon kaj rezultigis malgrandan kurson.





DIVERSAĴOJ

*Norvega Esperantisto.* La redakcia komitato konsistis el Johan Hammond Rosbach, Sarpsborg, kaj Hans Amund Rosbach, Kristiansund; dum la unua jarduono la unua estis ĉefredaktoro, sed tiam, post 25-jara fidela agado, subite eksiĝis. Feliĉe lia frato provizore transprenis la ĉefredaktorecon, alie la revuo estus ĉesinta aperi. Ĝis la jarfino nova ĉefredaktoro ne estas trovita. La gazeto estis redaktata ĉefe laŭ la samaj principoj, kiel en 1972. La «Fervojista Paĝo» de N.E.F.A. en ĉiu numero, sub redakto de Odd Kolbrek, estis ŝatata legaĵo ankaŭ de nefervojistoj. — Pro la tro alta preskosto ĉe A. Sæther, Hamar, oni devis transiri al skribmaŝina kompostado kaj ofseta preso ĉe Økonomitrykk, Bodø, kiu tre akurate liveris la numerojn. La «kompostadon» prizorgis Ludvig Anjer, C. Støp-Bowitz, Hans Amund Rosbach kaj Erling Killingbergtrø. Ĉi tiu produktmaniero signifis ŝparon de kelkcent kronoj por ĉiu numero, sed aŭtune ankaŭ Økonomitrykk konsiderinde plialtigis sian prezon. Feliĉe Haaves Boktrykkeri, Brumunddal, konsentis denove presi la revuon ekde 1974 por akceptabla prezo. La ekspedadon tre akurate prizorgis Randolf Grotmål. — Aperis 6 ordinaraj numeroj, el kiuj 4 16-paĝaj, unu 8-paĝa kaj unu 12-paĝa, sume 84 paĝoj.

*«Pro Merito».* — Ordena promocio okazis dum la festeno de la 43a Norvega Esperanto-Kongreso en Haugesund la 2an de Junio. Komandoro de la dua klaso fariĝis Hans Amund Rosbach, Kavaliroj de la dua klaso Karen Berge, Olav Andersen, Arthur Bjerke, Else-Margrethe Müller, Thor Magnus Carlsen.

*Biblioteko.* La pruntedoneblaj libroj daŭre staras en la oficejo de NEL., parto de la gazetkolektoj troviĝas en la domo de Kaare Myhr, cetere la Biblioteko estas kolektita en la malnova oficejo en Nedre Slottsgt. 3, kie Stefan Murak komencis ordigi ĝin. La kresko de la Biblioteko rezultis ĉefe el recenz-ekzempleroj, kiujn ricevis Norvega Esperantisto — kaj gazetoj ricevataj interŝanĝe kun ĝi. Pruntedoniĝis 13 libroj.

*Nordlanda kunlaboro.* Nordlanda Esperanto-Komitato daŭre ne montris aktivecon. La Kunlabora Komisiono, konsistanta el la prezidantoj de la 4 landaj asocioj (dana, finna, norvega kaj sveda), laboris precipe per korespondado kaj interŝanĝado de cirkuleroj; ĝi ne kunsidis en 1973.

*«Reisetrafikkforeningen for Oslo og Omegn».* La kunlaboro kun tiu asocio estas bona. Pluraj kopioj de ĝiaj filmoj «Bonvenon al Oslo» kaj «Oslo — la vikinga ĉefurbo» kaj de la diapozitivoj kun akompana prelega teksto daŭre cirkuladas en la mondo. Oni daŭre distribuadis la turistbroŝuron al petintoj en diversaj landoj.

*Norvega Ŝtata Fervojo.* Ankaŭ ties filmo «Mi estis tie» cirkuladas en la mondo, kaj oni helpis disvastigi ĝian broŝuron kaj tiun de la Fervojmuzeo en Hamar.

*Turisma Servo de N.E.L.,* sub gvidado de Kirsten Ek, peris informojn kaj aliĝojn por la norvegaj anoj de la kongreso en Beogrado kaj aranĝis aŭtobuskaravanon al la kongreso. — Aŭtune oni dissendis informojn pri la

59a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo.

*Internacia organizo.* La kunlaboro kun U.E.A. estis kontentiga. Ĉefdelegito por Norvegujo estas Alfred Skyberg, Komitatano A por N.E.L. estas Ludvig Anjer, C. Støp-Bowitz estas Komitatano B. En 1973 estis 62 Delegitoj en 20 lokoj en Norvegujo. La nombro de Individuaj Membroj de U.E.A. estis 88.

*58a Universala Kongreso de Esperanto* okazis en Beogrado. Partoprenis proks. 25 norvegoj. Reprezentanto de N. E. L. estis Olav Reiersøl. — La Norvega Registaro nomis R. Bugge-Paulsen, sed la nomigo ne atingis lin ĝustatempe. — En Beogrado finna ambasadoreja funkciulo salutis en la nomo de ĉiuj nordaj landoj en angla lingvo, kontraŭ kio N.E.L. poste protestis.

*Helpagado.* Oni daŭrigas la kunlaboron precipe kun Mocambiko.

*«Vivo de Zamenhof».* La transprenita stoko de la norvega eldono de Privat: «Vivo de Zamenhof» estas disvendata por kr. 3,00, sed la disvendado okazas malrapide (en 1973 vendiĝis 53 ekzempleroj). La stoko estas pagita, tiel ke la vendosumo reprezentas netan gajnon.

*Semajno de Internacia Amikeco.* — Ankaŭ en 1973 la aranĝo vekis intereson inter la membroj en multaj lokoj.

*Sliparo pri norvegaj esperantistoj.* La sliparo ampleksas nun 10079 slipojn pri esperantistoj en 792 lokoj.

*Koresponda statistiko.* N.E.L. kun ĉiuj komisiitoj kaj sekcioj dum la jaro ricevis 1183 leterojn kaj 932 presaĵojn kaj sendis 955 leterojn kaj 1796 presaĵojn.

*La intereso pri Esperanto* evidente estas konsiderinda inter la publiko. Kiam revuo aŭ gazeto aperigas nian adreson, ĉiam nia oficejo ricevas aron da informpetoj. Rimarkinde estas ankaŭ ke la korespondajn kursojn en 1973 mendis proks. duoble tiom da personoj, kiom en 1972.

*Konkludo.* Ankaŭ en 1973 la membronombro restis preskaŭ senŝanĝa (kresko de 3 membroj). Tio montras ke daŭre la alfluo de novaj membroj nur proks. kompensas la normalan perdon. Por eliri el tiu bedaŭrinda stato la kluboj kaj membroj devas grave intensigi sian inform- kaj varbagadon. Se ne eblas starigi ordinaran kurson, oni klopodu starigi malgrandajn studrondojn, montru al la korespondaj kursoj, klopodu aperigi la gazetan kurson, kaj antaŭ ĉio oni ne lasu la lernantojn al si mem post la elementa lerno, sed laŭ la konsilo de la landa kongreso en Haugesund oni zorgu pri daŭriga instruado ĝis ili vere scios la lingvon. Regante Esperanton ili ankaŭ grandparte restos en la movado.

Oslo, la 31an de Decembro 1973 / la 26an de Februaro 1974

*C. Støp-Bowitz* *Kjell Gustavsen*
*John Berggreen* *Signe Korstvedt*
*Olav Rygg* *Kirsten Ek*
*Aase Haube Nielsen*





# *Jarkalkulo de Norvega Esperantista Ligo*

SPEZOJ 1973

| | | |
|---|---|---|
| *Enspezoj:* | | |
| Klubkotizoj | | 3 576,00 |
| Rektaj membroj | | 1 601,50 |
| Norvega Esperantisto, membro-abonoj | | 3 900,00 |
| Norvega Esperantisto, rektaj abonoj, anoncoj | | 1 408,62 |
| Norvega Esperantisto, kontribuo | | 364,32 |
| Rentumoj | | 201,65 |
| Donacoj, lukontribuo | | 2 328,50 |
| Kampanjo Reisæter | | 2 900,00 |
| El la kontorfondaĵo | | 994,50 |
| El la kapitalo, deficito | | 338,39 |
| *Elspezoj:* | | |
| Kostoj (inkl. div. presaĵoj) | 5 401,76 | |
| Amortizo | 190,00 | |
| Norvega Esperantisto | 5 308,62 | |
| Luado | 3 323,00 | |
| Afranko | 1 352,70 | |
| Gazetara Servo | 1 447,40 | |
| Kotizoj al U.E.A. | 432,00 | |
| Kotizoj al distriktoj | 158,00 | |
| | 17 613,48 | 17 613,48 |

BILANCO je 31/12 1973

| | | | |
|---|---|---|---|
| *Aktivaĵoj:* | | | |
| En la kaso | | 88,17 | |
| Poŝtĝirokonto 1.00.30 | | 3 310,70 | |
| Meblaro | 1 906,88 | | |
| ÷ amortizo | 190,00 | | |
| | | 1 716,88 | |
| 254 akcioj en Eldonejo Esperanto A/S | | 5 588,00 | |
| Debitoroj : | | | |
| Prop.fond. en Oslo Sparebank | 6 384,82 | | |
| Andresens Bank | 4 331,42 | | |
| Div. debitoroj | 6 878,01 | | |
| | | 17 594,25 | |
| ÷ Kapitalkonto deficito | | 86,73 | |
| *Pasivaĵoj:* | | | |
| Div. kreditoroj | | | 9 986,24 |
| La kontorfondaĵo | 1 469,07 | | |
| ÷ lupago | 994,50 | | |
| | | | 474,57 |
| «Esperanto-nytt» | | | 3 465,76 |
| | | 28 384,73 | 13 926,57 |

| | | | |
|---|---|---|---|
| | | 28 384,73 | 13 926,57 |
| La Propoganda Fondaĵo | 10 103,38 | | |
| + rentumoj | 454,78 | | |
| + enspezoj | 445,00 | | |
| | | | 11 003,16 |
| Konservataj klubkasoj | | | 1 059,00 |
| Garantifondaĵo dumvivaj membroj | | | 2 396,00 |
| Kapitalo | 3 201,66 | | |
| ÷ Kampanjo Reisæter | 2 900,00 | | |
| ÷ amortizo akcioj agado | 50,00 | | |
| ÷ deficito | 338,39 | | |
| | | | 0 |
| | | 28 384,73 | 28 384,73 |

Oslo, la 31an de Decembro 1973 / la 26an de Februaro 1974

*Aslaug Refsing* *John Selbekk*
revizoroj

*Aase Haube Nielsen*
kasisto

## *Sekcio pri Koresponda Instruado*

SPEZOJ 1973

| | | | |
|---|---|---|---|
| Studmaterialoj kalkulitaj | 956,13 | Kurskotizoj | 2135,48 |
| Afranko | 264,60 | Rentumoj | 116,13 |
| Korektado | 409,90 | | |
| Profito, al la kapitalo | 625,98 | | |
| | 2251,61 | | 2251,61 |

BILANCO je 31/12 1973

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| En la kaso | 19,19 | Kapitalkonto je 1/1 1973 | | |
| Poŝtĝirokonto 1.00.30 | 303,11 | | 11501,46 | |
| Disponigita de N.E.L. por presado de nova kurso | 11805,14 | Profito 1973 | 625,98 | 12127,44 |
| | 12127,44 | | | 12127,44 |

Årets balanse er satt opp etter kassadagbok med bilag, som er revidert.

Trondheim, den 26. februar 1973

*Else-Margrethe Müller*
kasistino

*Erling Anker Haugen*
(revisor)






**FERVOJISTA PAĜO**

**ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA FERVOJISTA ASOCIO — NEFA**

**Kaldbakkstubben 22, Oslo 9**
**Redaktoro: Odd Kolbrek**



# La Ofotlinio kaj ĝia historio

Ĝi iras de Narvik al la landlimo kaj estas nur 42 km longa, sed estas fame konata kaj pro la minaĵtransportado kaj kiel turistlinio kondukante trans kruta kaj severtera altmontarregiono, norde de la poluscirklo. Dum multaj jaroj ĝi estis la plej norde situanta fervojo kaj estas hodiaŭ la plej norda elektrigita fervojo. Modernaj sekurinstalaĵoj laŭ la CTC-principo (teleregado) ebligas la plej grandan trajndensecon inter niaj unutrakaj linioj kun sekura trajnpasado kun nedeĵorataj krucigstacioj.

Proksimume la duonon de la varoj, de la tuta pezo, kiun transportas NSB, okazas laŭlonge de la Ofotlinio. La linio estas unuvice konstruita por servi al du signifoplenaj klientoj, kiuj ĉiam sendas la saman varspecon la saman direkton, okcidenten, bonkvalitan svedan minaĵon al maro

Por la norda Norvegujo la Ofotlinio peras rapidan rektan fervojinterligon al la kontinenta fervojreto, kaj por vojaĝantoj kaj por varoj. La Ofotlinio kaj Narvik atingis famon ankaŭ laŭ turista vidpunkto, kaj somere la trafiko estas granda. Malofte estas 45minuta trajnvojaĝo pli varia, kaj la kontrastoj pli grandaj — de la nefekunda vegetaĵaro de la altmontarebenaĵo al abundaj deklivoj kaj kampoj de la ĉeborda regiono. Sed la minaĵtransportado estas la ĉefa afero en ĉi tiu distrikto. La Ofotlinio, la haveno de Narvik kaj la urbosocieto kiuj ekestis ĉi tie, havas komunan historion firme ligitan al la sorto de la grandegaj minaĵejoj en sveda Lappland. En 1885 angla entrepreno ekkonstruis transportliniojn de la minejoj okcidenten al Narvik ĉe Ofotfjord kaj orienten al Luleå ĉe Bottenviken. Poste la sveda akcisocieto Luossavaara—Kiirunavaara Aktiebolag (LKAB) ricevis koncesion pri la uzado de la minejoj. La norvega kaj sveda ŝtatoj decidis mem konstrui la minaĵlinion inter Narvik kaj Luleå, kaj NSB komencis la konstruadon somere 1898. Jam la 15. de novembro 1902 la linio estis pretkonstruita. Tiam LKAB estis preta pri konstruado de siiaj manovrostacioj, kajoj ktp. en Narvik, kaj la minaĵtransportado pere de ŝipoj komencis. La ĉiujara transportkvanto diferencis de jaro al jaro

# Recenzo

## Fine ni povas ekscii la veron!

Tiel ŝajnas al mi taŭge titoligi recenzon de la libro «La participa problemo en la Akademio. Dokumentaro kompilita kaj komentita de Ebbe Vilborg.» (Eldono de Lingva Komisiono, 1973). Kiam la libro aperis, la reago de unu fama esperantisto estis, ke nun Vilborg volas veki mortinton. Sed leginte la libron, oni devas konstati, ke la participa problemo tute ne estas mortinta, sed nur endormigita per tro forta dozo da veneno.

En sia antaŭparolo Vilborg asertas, ke la pritrakto de la temo en la broŝuro «Aktoj de la Akademio 1963—1967» ne estas sufiĉa pro la jenaj kialoj: 1) La Akademio ektraktis la participan demandon jam antaŭ 1963. 2) «La cirkuleroj de la estraro estas skribitaj tute laŭ la vidpunkto de la aspektisma skolo (itismo). Pri la tre forta opozicio oni donas nur nerektan aludon, kaj nenie oni permesas al ĝi prezenti siajn argumentojn. Estas do necese, en la intereso de la esperantologio kaj de la historio, informi pri la agado kaj argumentado de la alia (tempisma) flanko.» 3) La broŝuro enhavas ne nur «aktojn», sed ankaŭ polemikon kontraŭ la «atistoj».

---

pro variaj konjunkturoj en la mondmerkato, krizaj tempoj kaj okupado. La ĝis nun plej granda transportkvanto, 10,7 milionoj da tunoj, atingiĝis en 1965. De la inaŭguro de la linio ĝis la fino de 1966 transportiĝis al Narvik 330 milionojn da tunoj da minaĵo. *(Daŭrigota)*

---

Vilbog do prezentas en sia «blanka libo» superrigardon de la *tuta* evoluado de la afero, kaj la plej grandan parton de la libro konsistigas aŭtentikaj dokumentoj el ambaŭ partioj. Profesia historiisto ne povus pli science publikigi historian materialon. Oni tamen ne kredu, ke Vilborg staris tute ekster la diskutado. La dokumentaro evidentigas, ke li tre aktive partoprenis ĝin je la «atisma» flanko, kaj ankaŭ la komentarioj al la dokumentoj respegulas tiun vidpunkton. Sed tio ne reduktas la sciencan valoron de la verko; tute male. Estas la devo de bona historiisto ne nur registri la okazaĵojn, sed ankaŭ ilin klarigi kaj pritaksi. Tia pritaksado estas des pli pravigebla en ĉi tiu kazo, ĉar la oficialaj komunikoj ĝis nun prezentitaj al la esperantistaro pri la afero, estas unuflankaj, misgvidaj kaj parte eĉ malveraj.

Ke la participa problemo ne estas mortinta, tion pruvas la jena epizodo, kiu ankaŭ estas tipa ekzemplo pri la agmaniero de la estraro de la Akademio: En 1967 la estraro voĉdonigis la Akademion pri la ĝusta interpreto «laŭ Zamenhof» de kvar testofrazoj, ne ĉerpitaj el la verkaro de Zamenhof! La prezidanto promesis, ke surbaze de la rezulto de la voĉdono la Gramatika Sekcio de la Akademio formulos regulon, pri kiu la Akademio poste voĉdonos. Tamen, kiam la voĉdono pri la kvar testofrazoj estis finita, la akademia prezidanto publikigis ĝian rezulton kiel la definitivan solvon de la participa demando. Li do tute malatentis sian propran promeson. Oni ankaŭ miras pri tio, ke respondeca lingvisto admonas al la verkontoj de lernolibroj bazi la priskribon de la pasivaj participoj nur sur la interpreton de kvar frazoj kaj ne sur ellaboritajn gramatikajn regulojn!

Entute estas okulfrapa la agmaniero de la akademia estraro: promesoj estis neplenumataj, la statuto estis malobeata, proponoj laŭstatute ensenditaj estis neglektataj (ĉiam -ata eĉ laŭ la aspekta vidpunkto, ĉar temas pri agoj, kiujn oni plurfoje ripetis!), kaj oficialaj komunikoj estis klare tendencaj. Sed la plej malesperiga aspekto de la afero estas, ke tia konduto ne havis konsekvencojn por la malobservantoj de statuto kaj promesoj. «Manipulado» en 1967 ankoraŭ ne estis moda vorto, sed la *fenomeno* estis konata de la akademia estraro jam longe antaŭ tiu tempo. Prezentas sin la demando, ĉu en la Akademio ekzistas sufiĉa garantio kontraŭ maljustaĵoj kaj nedemokrata konduto.

Dum la «itistoj» per manipulado kaj eĉ per insultkampanjo klopodadis altrudi sian vidpunkton, la «atistoj» ekde la komenco pledis por modereco kaj ĝisfunda scienca pristudado de la problemo. Plurfoje ili provis veni al interkonsento kun la alia partio, sed tiam ili spertis, ke la «itistoj» forlasis siajn proprajn iamajn starpunktojn. La temojn de la voĉdonoj la akademia prezidanto ĉiam pretendis prezenti senpartie, sed tamen li formulis ĉiam la «atismajn» vidpunktojn, ne konsultinde eĉ *unu* «atiston». Oni povas kompreni, ke fine ankaŭ kelkaj «atistoj» pliakrigis la polemikon.

En la antaŭparolo Vilborg modeste diras, ke li provizis la libron per «konciza bibliografio». Efektive la bibliografio estas ampleksa, kaj se oni deziras enprofundiĝi en la participan problemon, oni unue konsultu la bibliografion de Vilborg. Laŭ mia scio ĝi estas la nura listo pri tiutemaj publikigaĵoj.

La lingvaĵo de Vilborg estas klara, kaj lia 138-paĝa libro estas nemalhavinda dokumento, kiu liveras al la esperantistaro la veron pri la participa diskutado. Ĝi ankaŭ instruas, ke eĉ en la Esperanto-movado oni ne estu naiva kaj kredema, sed sagaca kaj atentema. Grava estas la atentigo, ke eĉ akademia decido ne povas flankenŝovi la netuŝeblajn regulojn de la Fundamenta Gramatiko.

Nur du kritikajn rimarkigojn mi havas pri la libro: ĝiaj multaj notoj malfaciligas la legadon, kaj — la libro estus devinta aperi multe pli frue.

Prezo: n.kr. 10,50.

*Otto Prytz.*

---

Komunaj Esperanto-Kongresvojaĝoj informas pri:

## Skandinavia trajnvojaĝo

internacia atmosfero jam de Kopenhago. — El Oslo 26/7 je la 22.40-a h., alveno Kopenhago 27/7 je la 8.53-a h. El Kopenhago je la 10-a h., alveno al Hamburgo je la 15.44-a h. De Kopenhago al Rødby per rezervita restoracia vagono. Hejmvojaĝo de Hamburgo sabaton la 3-an de aŭg. posttagmeze. Provizore indikitaj prezoj tien/reen proks. kr. 500. — Pliaj informoj ĉe

Kirsten Ek, Otto Rugesvei 66,
1345 Østerås, tlf. 24 05 64.

Partoprenas kursanoj el la Internacia Altlernejo en Helsingør.

Aliĝo kaj antaŭpago de 100 danaj kr. plej malfrue la 30an de majo 1974.



NORVEGA ESPERANTISTO

## Donaco al Norvega Esperantisto

F-ino G. Lemonnier, Vanves, Francujo, skribas al ni: «Mi legas en pluraj numeroj de «Norvega Esperantisto» vian alvokon pri kolektado de poŝtmarkoj. Bonvolu akcepti kelkajn el mia lando.»

Ni kore dankas pro la tre bela donaco, kiu zorgas, ke nia kaso ne restu malplena. — Ni kontente konstatas ke eĉ eksterlandanoj — kaj plej ofte eksterlandanoj — kontribuas al la poŝtmarkagado de Norvega Esperantisto. Ni konstante esperas ke aliaj sekvu la ekzemplon de f-ino Lemonnier, ne nur legante en pluraj numeroj nian alvokon, sed ankaŭ reagu.

Kaj ni memorigas: ĉion koncerne poŝtmarkoj sendu al Johan Hammond Rosbach, 1700 Sarpsborg, kiu daŭre okupiĝas pri tiu flanko de la gazeto.

Ni kaptas la okazon por informi ke ĝuste nun ni havas ĉ. 100 diversajn belegajn arabajn poŝtmarkojn, kiujn ni, senkonsidere al prezoj, povas vendi por po 50 øre. Temas pri katoj, hundoj, pentraĵoj, birdoj, astronaŭtoj, ktp. Pli ni ĝuste nun havas finnlandajn p.m. en nia stoko. Cetere ĉiam validas niaj ofertoj pri pakaĵoj, saketoj, p.m. por po 10 aŭ po 20 øre el la albumoj de Norvega Esperantisto. Ni vendadas relative bone en Sarpsborg. Ĉu ne la esperantistoj en aliaj lokoj kolektas p.m. aŭ konas knabojn, kiuj kolektas?


**HELSINGØR 1974**

*tuj antaŭ UK de Hamburgo*

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos 21.—27. de julio en La internacia Altlernejo de Helsingør. Ni invitas vin veni por ĉeesti — kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en internacia rondo dum la semajno tuj antaŭ la kongreso de Hamburgo. — Karavanvojaĝo el Helsingør al Hamburgo, kaj reen, estos aranĝata per trajno speciala por la kursanoj.

Programo senpage havebla ĉe

**L. FRIIS**
Ingemannsvej 9,
DK-8230 Åbyhøj, Danlando



NORSK ESPERANTO-FORBUND
*(Norvega Esperantista Ligo)*

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 1 00 30
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

*Turisma Servo:*
Boks 942, Oslo. Postgiro 1 00 32

ESPERANTOFORLAGET A/S
*(Eldonejo Esperanto A/S)*

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 1 00 31
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

*Ĉefdelegito de U.E.A.:*
S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo 6. Postgiro 1 33 29

*La redakcio:*
Hans Amund Rosbach, Nergt. 37 c, 6500 Kristiansund N. Telefon: 77 6 20

*Ekspedejo de Norvega Esperantisto:*
Boks 942, Oslo 1